



La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio
Fondita en Julio 1920.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kuponon.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 131 (Tenth Year) Melburno (Melbourne), Australio. Majo, 1931

OUR POSITION EXPLAINED.

Four months' income: £14/8/-. Four months' expenditure: £19/14/6: deficit: £5/6/6. Why? Let us see. Out of some 210 from whom we should receive regular subscriptions, only 140 are paid up; furthermore, some of these are valid for more than one year—some of them are first-year subscribers, to be regarded as weak reeds until their second subscription comes to hand. The cost of producing the S.K. is £56/5/- a year; 140 subscriptions at 4/6 yield only £31/10/-, on the wrong side £24/15/-. It will be seen then that at least 200 regular subscribers are essential if the S.K. is to pay its way on its own value. In other words, sixty more valid names are needed to carry the paper across the flood of present evil circumstance. While it is open to question whether it can be done, there is no doubt that such is the only satisfactory way. The list in this issue of those that sent money contains for the most part names well-known in the movement; scores to whom notices of subscription-expiry were posted are seemingly indifferent to the imminent danger confronting our enterprise. This is not fair to the few who give time and again; it is not fair to the administrator, who feels that the S.K. merits a role more dignified than that of alms-receiver at the door of the Esperanto movement in a part of the world supposedly progressive.

While heartily grateful to individuals, to the Melb. Esp. Soc., and to the N.Z.E.A. for their selfless activity on behalf of the gazette, the writer is urged to warn the general body of responsible Esperantists in this hemisphere that future years will hold for them a standing reproach in that they lacked, in a time of crisis, an associa-

tion of clubs, societies and groups throughout Australia and N.Z., under whose aegis a firmly founded organ could have regularly gone forth.

April 29th.

—R. Banham.

ANKORAŬ ŜATESPRIMO.

Skribis s-ro T. Jung, redaktoro de "Heroldo de Esperanto," en letero al Box 731F.: "La Suda Kruco" estas eta, kaj laŭ tipografia vidpunkto la artikoletoj estas iom tro kunpremitaj; sed mi ĉiam ĝojas, kiam ĝi alvenas. Ĝi estas pli regula ol multaj pli grandaj organoj, kaj ĝi estas bona pruvo por tio, ke en la malproksimega (de ĉi tie) Aŭstralio la samideanoj ankaŭ laboras kuraĝe kaj diligente. Do, mi gratulas vin precipe pro la regula eldonado de via organo."

(Legante la supran laŭdon de unu tia ŝatanto, nepre kompetenta por ĝuste taksu la kvalitojn de nia gazeto, ĉu ne vere, ke eĉ la plej apatia ricevanto de ĝi sentas puŝon de l'spirito kaj riproĉon de la konscienco, en tio, ke li lasis gliti nian organon jam ĝis la efektiva rando de la abismo?)

ESPERANTO ON THE MARCH.

Since our last issue we have learned—

That the Paris Esp. Federation has been granted a subsidy by the Conseil General de la Seine (a body similar to the London County Council); the municipal councils of St. Etienne and Orleans have also helped in like manner the Esp. organisations in those towns.

That the French "Annuaire Industriel," big trade directory, now contains an Esperanto section.

The Italian Touring Club, membership 400,000, has issued an "Italian Baedeker" guide book to Milan and the Lakes of Lombardy. Satisfactory sale

will mean definite winning over to Esperanto of the largest tourist assoc. in the world. Price 5/-, inc. post at B.E.A.

That a new fortnightly, *Katolika Vivo*, is published at 22 Cours Albert-Premier, Paris 8e. It spreads news of the Roman Catholic Church throughout the world.

That 1,300 "Andree" books ("Per Balono al la Poluso") have already been sold.

That there are 6,262 teachers of Esperanto in 61 countries of the world, according to the latest statistics compiled by Dr. Dietterle. Esperanto is taught in 926 schools in 38 lands.

That the illustrated Polish review *Spolnota* printed an article in Esperanto on the necessity of securing to Poland the town of Danzig as an outlet to the sea. One example among several of the use of a neutral language for national propaganda.

That a chair of Esperanto has been established at Leningrad University. In this city are 50 Esp. groups. There is also a course running at Irkutsk University.

PROPOSED SYDNEY CONGRESS

Would all Esperantists likely to be able to attend an Esp. Congress in Sydney about January, 1932, kindly get into touch with Mr. Rutland, c/o W.E.A., 2nd floor, Manning-ch., 449a Pitt-st., Sydney, who is a member of the Congress Committee.

"LITERATURA MONDO."

We have received the first three numbers of the above publication. Enjoying the collaboration of the finest writers of Esperanto to-day, this monthly, published in Hungary, aims at giving permanence to the choicest work now being achieved in the language, and at exercising the closest scrutiny over all such books as merit its competent appraisal.

Printed on the finest art paper with a technical perfection that commands admiration, this review should receive the support of every Esperantist who can appreciate the beauty, wit, and realism that characterise the belletristic literature of our language.

Our old Melbourne club member, Mr. L. Thomson, is the agent in Australia

for the "Literatura Mondo." See advt. in this issue.

"KOMPLETA ESPERANTA RIMVORTARO."

Jen libreto, kiu devas sidi sub la mano de ĉiu versfarulo verdstela. Kial longe cerbumadi, serĉante rimon por "kaĉ"? Ekrigardeto en la verko tuj donas la bezonatan "maĉ", aŭ—"kraĉ"! La uzanto demandas al si, por kio staras en la teksto radikoj ankoraŭ nerimeblaj, kiaj akv, falĉ, aln, fajf. Tial, li legu kunkune la eruditajn artikolon de d-ro Kalocsay pri La Esperanta Rimo, en *Literatura Mondo*, n-ro 3. Vera monumenteto modesta al fera pacieneco de la aŭtoro, Maur. Jaumotte, por kiu publikigis La Belga Esperanto-Instituto, rue du Petit Chien 11, Antverpeno. Prezo 2 belgaj frankoj.

KRONIKO.

Melbourne, Vic.—Ĉe la Societa kunveno je la 3la de Marto, s-ro Percy Holmes donis paroladon pri la telefono. Li priskribis la antikvajn metodojn de komunikado ĝis tiuj de la nuna tempo, kaj klarigis pri la elektra magneta principo de prof. Graham Bell, kio estas hodiaŭ la sama, fundamente, kiel kiam li elpensis ĝin.

Iun sabaton antaŭ ne longe, kelke da Societanoj faris ekskurson ĝis St. Helena, ili ekvidis inter la arboj, etan malnovan preĝejon, kiun oni nomas "Roza Kapelo." Ĝi estis konstruita en 1859 de Anthony Beale, kiu alvenis de St. Helena kun sia familio en 1839. Fenestroj, predikejo, memorkartuŝoj, kaj baptopelvo restas kiel memoraĵoj de la mortintaj familianoj, kies tomboj sin trovas en la tombejo apud la kapelo. Oni diras, ke la familio loĝis en St. Helena dum la mallibereco de Napoleono.

Coburg, Melbourne, Vik. — Kontentige progresas la Coburg'a Esperanto-Klubo, kiu kunvenas ĉiujauĉvespere en The Labor Hall, Sheffield-st., Coburg.

En 26 marto anoj aŭskultis al instrue interesa lekcieto pri Roturua, unu el la ĉefaj termalaj lokoj en Nov-Zelando. Donis ĝin f-ino Ivy James, kiu per siaj informricoj kaj parolstilo alte plaĉis al tridekelko da ĉevenintoj. Ŝi ilustris dirojn per p.k.-oj de la ŝprucfontegoj kaj bolkotejoj, kaj per specimenoj de la koncernaj argiloj, sulfuroko

kaj rezino el "kaŭri"-arbo (dammara australis).

Membroj preskaŭ ekscitiĝas pro tablotenisa konkurso, kiu komencis en 30 aprilo. Porviran kaj -virinan premiojn donacis s-ino A. Hintze kaj f-ino O. Spencer. Espereble la konkurso kaj la ofte aranĝataj festamuzaĵoj provizos al ĉeestantoj belajn okazojn por lertigi la langon je nia muzika lingvo.

Balwyn, Melb.—Nova grupo el dek personoj kunvenas ĉiusemajne en la hejmo de s-ino Mumford (nee Sinnotte). (La membroj studas diligente kaj donas al la gvidanto motivon esperi.

TO OUR SUPPORTERS.

Thanks for the following: Mr. F. Thomas, 4/6 jan., '32; Mr. F. McLeod, 4/6, apr., '32; Mr. D. B. Thomson, 4/6, feb., '32; Mr. F. Davey, 4/6, jan., '32. Mr. M. Barnett, 9/-, mar., '32; Mr. N. Thomas, 9/-, julio, '32; Miss Griffin, sales, 1/8; sales at Club, 2/-; Westralian E. Soc., 5/6, julio, '31; Mr. H. Facer, 5/-, majo, '32; Miss de Novak, 5/-, apr., '32; Mr. N. Perkins, 4/6, jan., '31; Mr. O. Behncken, 5/-, mar., '32; Miss D. Wells, 4/6, mar., '32; Mr. M. Hyde, 20/-, jan., '34; Mrs. McNab, 5/-, dec., '31.—Total, £4/14/2.

Donations in response to appeal: Mr. H. Byatt, 20/-; Messrs. Barnett and Thomas, 2/-; Miss Trundle, 5/-; "Amikino," 10/-; Mrs. McNab, 5/-.—Total, £2/2/-.

ASIATIC ROOTS IN ESPERANTO?

Stephen Mladenov, professor of comparative philology at Sofia University, while approving Esperanto in certain points, doubts the wisdom of Zamenhof in limiting to the chief culture tongues of Europe the field from which he drew his "international" vocabulary for the language (see Heroldo de Esp. 12/9/30). He says inter alia: "In its present aspect Esperanto is principally a Latin-Germanic language; Slavic elements in it are very few, nothing is taken from great branches such as the Indo-Chinese, the Semitic, and the Ural-Altaic. In order that Esperanto be truly international in its elements all those languages should be laid under contribution..." The founder of Bahaism, Abdul Baha, while urging that all his disciples learn Esperanto, also challenged the soundness of Zamenhof's decision, when he asserted that

"Esperanto should contain roots drawn from diverse languages" (p. 121 Baha'u'llah kaj la Nova Epoko).

Now, to diversify or enlarge the basis on which the international language is set would merely result in making one of its conditions, ease of learning, impossible. The Asiatic has nothing to gain by the inclusion of non-European roots, for if say Japanese stems were introduced, Chinese, Hindustani, Persian, Turkish and others would infiltrate, the outcome being that the Japanese Esperantist would find himself compelled to learn hundreds of words more strangely exotic to him than the comparatively well-known French and German neologisms that are ever drifting into Esperanto literature, for the natures of these European languages are more or less familiar to every Japanese student, whereas Hindustani or Turkish is as unknown to him as Sanskrit.

From Europe, Russia and America over the rest of the world radiate the dominant influence of ideas sociopolitical, philosophical, religious. The net of Occidental commerce enfolds the globe; the tongues of the Western world are heard along every Eastern seaboard. It is clear, then, that the success of any project of interlanguage depends on its prior acceptance and use by the nations of Europe. When these unite to overcome the barriers of language, they will fall throughout the civilised world.

The relatively wide use of Esperanto by an eastern nation, Japan, has not, so far, made it necessary for the Language Academy to sanction as official a single Japanese root. Some few words such as "kimono" have, of course, long been fully international, and as such have been assimilated into Esperanto under its 15th rule. Japanese Esperantists have found that in translating pieces of their nation's literature only a very moderate introduction of Japanese stems has been necessary, and in using them they have for the most part only resorted to the recognised device of imparting by that means a certain national flavor to the text, even as English writers do with their albergo, estaminet, podesta, midinette and so on.

When the full history of the international language is written it may well be that to Dr. Zamenhof will be

given the credit for the keenest foresight in laying down a principle, the knowledge of which was essential to the right constructing of the common auxiliary tongue of mankind—the principle that warrants Esperanto in naming itself a synthesis of the international elements of Europe's culture tongues.

“PINOKJO”

de C. Colodi (trad. el itala originalo Mirza Marchesi).

La literaturo Esperanta estas ne tre riĉa je la gemoj de l'vere valora porinfana verkaĵaro, jam legebla en ĉiu grava nacilingvo. Ekzistas nur tradukeretoj el laboro de fratoj Grimm, kies fantaziaĵojn streĉokule ensorbis etuloj de kultura tutmondo. Ekster la brila traduko de la Andersen'a fabelaro, “La Karavano” de Haufmann, la elĉerpo el la “Mil kaj Unu Noktoj”, “Rakontoj pri Feinoj” de Perrault, kaj garbetoj dise kolektitaj el fruktoplenaj kampoj de l'germana popolimago, estas malmulto taŭga por kontentigi al tiu, kies juneca animo ankoraŭ iam sopiras la naivajn songflugojn de l'infanjaroj.

Kiam, en mezo de la pasinta jarcento, Carlo Lorenzini verkis la unuan linion de “Pinokjo” — “Kiamaniere majstro Ĉerizo, lignaĵisto, trovis pecon da ligno, kiŭ ridis kaj ploris kiel infano”—li jam ekkomencis skribon destinotan eternigi lian nomon ne nur en la korjoj de la itala etularo, sed ankaŭ, ni nun rajtas diri, en la korjoj de fantazi-amantoj tra la civilizita mondo.

Plue, ĝia allogo ne limiĝas je la junaĝuloj. Dum lego en vespera horo, maturulo, lasante liberon al sia spirito, enpenso sin trovas transportita en sian ludĉambran liteton de antaŭlongaj jaroj, por tie dolĉe dronadi en tiuj mirsongaj aventuroj, kiuj lin ravis tiame. Li iras kun la petola pupeto, kreita el ligno de baldaŭ bedaŭranta tion ĉar-pentisto. Li akompanas ĝin sur vojoj semitaj dense per multspecaj danĝeroj. el kiuj ĝi lerte elturnas sin aŭ ĝustatempe trovas helpeman manon por tio. Ĉiu situacio de la kompatinda Pinokjo, kiun la vivo senĉese persekutas, estas prirakontita kun netrudaj, bele enteksitaj linioj pri la moralo, kiom ĝi tio rilatas al la formiĝanta spirito de la juna leganto.

Estas sentata tra la traduko la varma spiro de la suna Toskana, la gajige stranga komikeco de la riĉe dotita Col-

lodi. Troviĝas kelkaj kritikindaĵoj rilate la lingvon, jene: Pĝ 1, hejti (varmigi) la ĉambron; 14/15, kial “daŭris grumbli,” “daŭrigis dormi”?; 18, de kvin kilometrojn (!); 22, varmumis (varmigis); 26, vipilo (vipo), ogro (giganto); 46, aer-koloran (?); kelkloke oni legas frazojn ŝajne tro idiotismajn, kiaj 84, “Kian sukoni vi trovis, kredigante al mi la historieton pri la ŝarko?” (ĉu vi opinias min stultulo, penante kredigi min...?); 121, “Paciencon unu kornon!” (slango?); 92, fumumitan (fumaĵ); tranĉumita (pecete distranĉita); 132 malkonvenan (? fortfrapan); 135, “ke mankis nur ereto al ke li falu delirante” (ke preskaŭ li falis...); troa uzo de -um, tiumita (tinee mangita, difektita de tineoj); 148, muldas (min la vesto), (la vestoj bonege sidas, Zamenhof); 150, P. ne sciis plu eĉ li, ĉu li estas vere vekita aŭ ĉu li songas” (eĉ li?). La 50 lastaj paĝoj estas ne zorge verkitaĵoj kaj bezonas kontrolon de revizianta neitallingvano.

Prezo 3/6 kaj 5/- ĉe B.E.A. (Robo.)

SE GRENERETO...

de Kenelm Robinson

eldonita de Heroldo de Esperanto
160p. tole bindita, ses ŝil.

Kolekto da diversaj verketaĵoj el kiuj kelkaj jam aperis diversgazete Esperante.

Kiel provo respeguli por tutmonda legantaro la animinfluan, moraron kaj lingvaĵon (eĉ fian) de angla pensionlernejo (boarding school) porknaba, la ĉefa vortbildaro eble rajtas preson. La verkinto tamen ne plene sukcesis, penante traduki Esperanten tipajn tiaknabajn esprimojn. Ŝajne li mem sentis tion, ĉar por neanglalingvanoj li antaŭgardante prezentis kun piednoto certajn vortojn prenitajn rekte de sur la knabaj lipoj. “Inda knabo” tute ne redonas la nepre delikatan, malfacilege kapteblan nuancon de l' angla “decent chap”; “stultulo” nur malforte “silly ass.”

Oni ĝenerale ne aprobas la lingvaĵon per kiu la aŭtoro elektis pritrakti kelkajn epizodojn ellaborante sian temon. Ĉu necese paradigi antaŭ nefakula mondo tiom malagrabla la sepan interparoladon kaj porkejaĵajn petolaĵojn de iuj maturiĝantaj junuloj? Tia “literaturo” pliĝuste troviĝas sub la nazo de pensputraj stratbuboj ol sub tiu de la normala Esperantista publiko, kies

aĉetsubtenon la aŭtoro supozeble celas. Nur en fakskriboj de Ellis aŭ Freud tia esplorado en homaj sterkaĵoj havas konvenan lokon. La scienco ja devas ĉion ampleksi. Sed por distra aŭ pripensiga legado, ĉu ne estas ofendo tio, ke leganto iam kaj iam ricevas frapojn al lia (aŭ ŝia!) sento pri eĉ minimuma dececo?

La unua, La Paganta Gasto, ankaŭ dubdece tema, estas la plej artiste sprite verkita en la libro. La aŭtoro satire priridas la sintenon, por li nelogikan, de angla burĝino rilate la nasklimigan demandon.

La enhaveroj "Pri Schwarz en Britujo" kaj "La Plagiado" estas interesaj; kaj tiu ĉi lasta eĉ valoretita instigilo al eventuala serioza kontribuado pri la koncerna temo—la vortoj kaj iliaj pensapartenajoj. La unua estas nebeligita de la lasta linio, cetero sufiĉe nebulsignifa.

Neologismoj: morna (malgajiga, neterece timetiga); evento (definitiva okazaĵo); etoso (animo de loko); aprezi (ŝate kompreni, ŝate taksi, precipe en artaferoj); darf, irit, tofeo (butersukeraĵo); dribl, faŭl, hafo (tri futbaltermoj).

Prof. Cart lastatempe tre riproĉis eĉ laŭtnomajn verkistojn pro ilia ignoro al konsilo de Zamenhof rilate uzon de infinitivo post "sen" kaj de "daŭrigi" antaŭ infinitivo. Tamen la Plena Vortaro donas la formojn tute senkomente kiel bonajn. Plagio (plagiato); libera verbigo de neverbaj radikoj—pretas, patri, edzi, fivorti, malpuri, reali, krueli; bonfamo (absurda kiel tradukvorto por la angla "goodwill (of business)", klienteca garantio; maltrinkado 92/4 (?); 101/4 pretendi (ŝajnigi), 104/3 ignori (nescii pri), 109/7 ŝajnis ignori (ŝajnis nescii, aŭ, simple, ignori); sedonta ("but me no buts"; derivita el "sed," havas sencon "about to demur"). (Robo)

KIEL ADRESI LETERON ALILANDEN?

(el malnova Heroldo de E.)

.....oni neniam bezonis, neniel bezonas kaj konjekteble nenioakaze bezonos uzi internacian lingvon por taŭge adresi korespondaĵon en fremdlandon. Jam de longatempe, multe antaŭ ol Esperanto ekzistis, oni povis tute oportune, sen ia malfacileco adresi leteron fremd-

landen, kaj la uzita kaj ankoraŭ ĉiutage konstante uzata rimedo estas tre simpla: la parton de la adreso, kiu montras la nomon de la adresato, la straton kaj la urbon, oni skribas en la lingvo de la lando, kien la letero devas alveni, kio estas facile ebla, eĉ se oni tute ne konas tiun ĉi lingvon; kaj la nomon de tiu fremda lando, kien la letero estas sendota, oni skribas en la lingvo de la lando, el kie la letero estas sendata, tio estas en lingvo ordinare konata de la skribanto.

Tiu ĉi tre simpla farmaniero sufiĉas por ke la letero ĝuste atingu la adresaton, ĉar la poŝtofiscistoj de la deira lando, facile leginte la nomon de la fremda lando skribitan en sia propra lingvo, sensanceliĝe metas la leteron en la poŝtsakon destinitan por la celata lando. Aliflanke, kiam la sako alvenas en ĉi tiun landon, la poŝtofiscistoj, ne bezonante povi legi la nomon de la lando, legas facile la nomon de la urbo kaj de la strato kaj direktas laŭcele la leteron.

Tio estas malsaĝa fanfaronado, se oni pretendas trudi al la ĉiulandaj poŝtofiscistoj la komprenadon de iu lingvo, kiun ili tute ne bezonas por bone plenumi sian oficon. Tiŭ ĉi senutila pretendo riskas kontraŭe malfavorigi ilin al Esperanto. Ni propagandu, ni fervore kaj senlace propagandu, sed ni ne propagandu blinde kaj malĝustokaze. Tiuj faras maltrafan kaj malutilan propagandon por Esperanto, kiuj provas trudi ĝian uzon en la okazoj, kiam ĝia uzo estas sencela kaj eĉ iomete ridinda.

—Prof. E. GROSJEAN-MAUPIN, Direktoro de la Akademia Sekcio por la Komuna Vortaro.

LEPRULOJ ESTAS RESANIGEBLAJ.

(The "Age," Melbourne, 6/1/31.)

La informo, ke 37 lepruloj sur Peel Island, en Moreton Bay, apud la enmariĝejo de la rivero Brisbane, ricevas kompletan resanon, estas afero tre frapa por la homaro, ĉar ĝi signifas ankoraŭ unu grandan triumfon por la scienco medicina, post multjaraj dancienca kaj persista serĉpeno. Peel Island plej gravas el la kvar izol-hospitaloj fonditaj en Aŭstralio por kuracado al lepruloj. La ceteraj estas ĉe Little Bay (Nov-Sud-Kiujaro), Cos-sack (Okcidenta Aŭstralio), kaj Dar-

win (Norda Teritorio). Feliĉe, ĉi tiu timinda malsano ĝis nun trafis nur malmultajn viktimojn en Aŭstralio; la nombro de kazoj ĉe la kvar izolejoj estas ne pli ol 150. Male en Azio kaj Afriko la skurĝo larĝe paŝas. Oni renkontas en multaj landoj Eŭropaj la frapitajn de ĝi—en Centra Ameriko, en la Okcidenta kaj Orienta Indio, ankaŭ en la Pacifikaj insuloj. La armeo de tiuj falintaj sub ĝia falĉilo jam nombras milionojn, malgraŭ tio, ke la suferantaj ofte vegetas dum jaroj. La kaŭzo kaj sukcesa kuracado de la lepro ĝis nun restis nekonataj de la medicina scienco, sed de tempo al tempo fakuloj ellaboris interesajn teoriojn rilate al ĝia kaŭzo. Unu el la plej atentotiraj estas tio, ke manĝadi fiŝojn kaŭzas lepron. Ĉi tiun teorion subtenas la fakto, ke la malsano ŝajne pli ofte atakas homojn loĝantajn sur insuloj kaj ĉe marbordoj, ol tiujn, kiuj loĝas en landoj situaciitaj neproksime al maro.

La lepro estas parazita malsano, infekti-pova per intertuŝo. Pro tio oni starigis izol-hospitalojn en civilizaj landoj; sed en multaj neprogresaj landoj, kie la malsano mortfalĉas milojn da viktimoj, la principon de izolado oni ankoraŭ ne akceptis. Malgraŭ tio, ke estas tre konsilinde konsideri kun ioma skeptikeco antaŭ ol doni plenan kredon al informo pri metodo resanigi homon suferanta de malsano, kiu jam de jarcentoj defiis la sciencon, tamen nun ekzistas rajto, ke oni ekkredu ĉi tiun novaĵon, ke fine la kuracistoj ĉe Peel Island jam sukcesis resanigi lepro-pacientojn. Kvin suferintoj ricevis forir-permesojn de tiu hospitalo ĉe Kristnasko, post *finprovado longa* 15 monatojn. La obstina, kaŝdanĝera naturo de la malsano necesigas multe da kontrolo prizorgo antaŭ ol la kuracistoj rajtas pretendi plenan sukceson, sed tiu kontrolo tempo ŝajnas al laiko *ja sufiĉe longa*.

La kuracilo uzata ĉe Peel Island estas alpol, farita el oleo de la arbo ĉaŭlmogro (gynocardia odorata), unu el la medicinaj pocioj prieksperimentitaj

kun diversaj rezultoj en kelkaj landoj. Oni konstatas, ke la kuracado pli kontentige efikas en la komencaj stadioj de la malsano, kaj ke la kazoj de firme enradikiĝinta lepro tre povas longege rezisti al la resanigistoj. Tamen la fakto, ke post longa kaj zorga kuracado oni raportis la plenan resanigon de 37 lepruloj, signifas difinitan venkopunkton por la medicina scienco en ĉi ties batalo kontraŭ naŭza pesto, kiu dum pli ol tri miljaroj mortoportante entranĉas en la homaron.

1928, 1929, 1930

JARKOLEKTOJ DE "LA SUDA KRUCO"

ESTAS HAVEBLAJ

ĉe Box 731F, P.O., Elizabeth-str., Melbourne.

TRE AKTUALAJ!

Prezo: tri ŝilingoj, inkluzive send-kosto, por ĉiu.

(fratorganoj bv. represu)

THE BABEL BOTHER.

One of the fascinating things about life is the indefinite number of new worlds which we can discover. Whoever it was said that "one half of the world does not know how the other half lives," he had his fractions wrong. Which of us, on making a new friendship with someone of a different class or creed or trade or language, does not share the excitement of Columbus?

To most of us the world of Esperanto is such an unknown realm. We may agree that a universal auxiliary language is inevitable. Here is such a language already in practical use. It is highly interesting to see how it works out. It is appropriate to do so at this moment since the International Esperanto Congress met in Oxford Town Hall last August. The first point that strikes one is the large number of works that have been translated into Esperanto, and the ease with which translations are made. This facility is probably due to the fact that the translators are compatriots of the original

HAROLD PUDNEY

Kial fuŝe skribaĉi per kripila fontanplumo? Vi povas denove senti tiun plezuron, kiun donas facile funkcia fontanplumo, se vi alportas ĝin al H. Pudney, multjara spertiĝinto, kiu lerte riparas ĝin je malalta kosto ĝis re-

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

Specialisto pri Fontanplumoj

noveco.

Ĉu nova fontanplumo kiel donaco, aŭ por vi mem? El ĉiu speco il' kuŝas ĉe li je facilaj prezoj. Aparta atento donata al poŝt-mendoj.

Notu adreson:—

writers, Shakespeare being translated by the English, Tolstoi by Russians, and even the Old Testament by Dr. Zamenhof, himself a Jew. At any rate thousands of books are now available in Esperanto, particularly classical and sociological works, and collections of national poems, fables and folk songs.

The next point which strikes one is the interest which one finds in reading national viewpoints, when put in such a form that they can be palatable even to readers from nations next door and so as to accuse no third parties. This occurs particularly in the Esperanto weekly journal, "Heroldo," and also in the weekly broadcast talks which are given by some 20 or 30 stations in Europe, Asia, America and even Australia. It is a convincing way of keeping the national point of view before the world, and I hope that it may not be long before the British point of view is also given currency in the same way.

In international conferences the use of a single auxiliary language is of obvious advantage. There is no loss of time in translation. Every speech receives full weight, there being no privileged position for those who speak in a "majority language." There are no difficulties about reporting, and no disagreement owing to the different meaning of the same word in different languages.

An unexpected advantage is that, in speaking Esperanto, one finds one lacks that uncomfortable feeling of inferiority one has in talking, say, French with a Frenchman, or of inability to put a foreigner at his ease when talking English.

One is struck by the great variety of people attending Esperanto conferences. One meets professional and business men who have never had time to learn to speak an ordinary foreign language fluently, and numbers who have never had the chance of doing so. Both these groups are well represented, and probably form the bulk of the at-

tendance. Intellectuals and much-travelled people with internationalised outlook are less predominant than in other international gatherings. Experience, both at conferences and elsewhere, shows that national divergences of pronunciation are negligible.

Figures show that some 10,000 persons are members of the Universal Esperanto Association, which has its headquarters in Geneva. Somewhat over 100,000 persons are in touch with one or other Esperanto organisation, while it is estimated that roughly a million people know the language to some extent. The number has been increasing rapidly in the last few years, owing to broadcasting, to the growth of specialists bodies like the Catholic Esperanto League and the Socialist Esperanto organisations, and owing to the efforts of individual enthusiastic teachers.

The countries in which Esperanto has obtained most supporters are: Germany, Czechoslovakia, Sweden, Great Britain, Austria, Japan, Holland and Russia. During recent years it has received, however, a great impetus in the smaller European countries, whose languages visitors cannot be expected to know. In these countries Esperanto is welcomed as an alternative to the general instruction in their schools of the language of one of their powerful neighbours, from which there is felt to be a real danger of cultural domination.

The purpose for which Esperanto is most widely used at present is probably private correspondence. Every week "Heroldo" contains anything from 10 to 50 advertisements for correspondents, sometimes on any subject, more often on matters relating to particular professional, political or social interests, or hobbies. Some of these "contacts" are of short duration. Many continue for years, and lead to interchange of visits and lasting friendships. Humanity is thus the gainer by a considerable number of personal international relation-

"LITERATURA MONDO" REAPERAS REGULE!

24/32 Pages Every Month.

Contains the best and most up-to-date Esperanto reading matter by the leading original authors of ESPERANTUJO, including F-ino Lidja Zamenhof and D-ro F. Zamenhof.

Subs. yearly—10/- or 1/- per month.

WRITE AUSTRALIAN REPRESENTATIVE:

L. Thomson, D.B.E.A., "Tallangetta," Church-st., Pymble, N.S.W.

ships.

Commercially its use is mainly confined to advertisements by international fairs (Leipzig, Lyons, Paris, etc.), State railway administrations (Japan, Switzerland, Austria, etc.), and health resorts (Wiesbaden, Torquay, etc.). For personal use a really noteworthy system has, however, been evolved by the Universal Esperanto Assn., from headquarters in Geneva. Every member who pays an annual subscription of 4s. to the Association has the right to call on the services of an Esperanto "Delegate" in some 1,800 different localities scattered over the world. Great use is made of this system, as the delegate will engage rooms, meet trains, recommend agents and places of business, provide introductions to suitable persons, and to the local Esperanto societies. In most capitals there is now an Esperanto office with a permanent staff and at least two or three different clubs which meet once or twice weekly. All these are at the service of any member of the Universal Association. The consequence is that when visiting any of the places on this list he finds himself not merely confined to hotel society or that of persons to whom he may bear introductions, but at once admitted within the barriers of the national circle.

I claim that in Esperanto it has been shown that such a language is practicable, and that the adoption of such a language, whether national or artificial, would be a material help towards solving the problem of world organisation for peace.—F. B. Bourdillon, in "Headway," organ of the League of Nations Union.

LEGEMAJ ESPERANTISTOJ.

Notu adresojn de tre abonindaj gazetoj—

Literatura Mondo, agentita de L. Thomson, Church-st., Pymble, N.S.W.

La Movado, 104 rue de Richelieu, Paris 2e.

Heroldo de Esperanto, 94 Brüsseler-str., Köln.

International Language, 142 High Holborn, London.

WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY kunvenas ĉiun jaŭdon je 7-30a horo vespere, ĉe 197 Murray St., Perth, kontraŭ Boans Ltd, Prezidanto, S-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretariino, F-ino E. Griffin, 135 Central-av., Maylands, W.A.

Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo. Prezidanto, S-ro Johns; Sekretario, s-ro H. Franks, 38 Worksop-rd. Kunvenas en ĉiu mardo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

Auckland (N.Z.) Esperanto Societo kunvenas la duan lundon de ĉiu monato je 7.45a horo vespere ĉe Nov-Preĝejo Halo (New Church Hall) Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell. Sekretariino: S-ino E. M. Watkin. Komunikajojn al la prezidanto ĉe Kent's Buildings, Newmarket, Auckland.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro P. Hudson; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Scots Church Hall, 97 Russell St. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 6.30a vespere.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro E. A. Pryke, D.B.E.A.; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

Brisbano Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Maŭrico Hyde, FBEA. Vicprezidantoj: fraŭlino Rose Macpherson, Klement Kidd. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del: UEA). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, GPO, Brisbane, Kvinslando (Queensland).

Wellington Esperanto Club.—Meet every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralie Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar. Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.